

Al ĉiuj belgaj Esperantistoj

Novaj favoraj perspektivoj prezentigas al la Esperanto-movado sur la tereno de la propagando por la Lingvo Internacia.

En 1965, okaze de sia 65-jara vivjubileo, G-roj Maurice JAUMOTTE-LOQUET donacis 50.000 b.f. por starigi fondaĵon, kiu ricevis la nomon "FONDAĴO MAURICE JAUMOTTE-LOQUET".

CELO : En la spirito de la donacintoj, la donacita sumo estu la komenco de kreskanta kapitalo, je la dispono de la belga Movado por Esperanto kaj speciale de "Belga Esperanto-Federacio", por specialaj propagandaj celoj, malfacile realigeblaj per la ordinara rimedoj de la movado.

PROPRIETO : La Fondintoj donacis la dekomenca sumo al B.E.F., kiu havas juran personecon, sed en limigita proprieteco, en tiu ĉi senco, ke nek la Estraro, nek la Administrantaro de B.E.F. rajtos malpliigi aŭ nuligi la Fondaĵon per vendo de akcioj, obligacioj aŭ aliaj posedaĵoj de la Fondaĵo.

ESTRA KOMISIONO : Laŭ propono de la Fondintoj; la du regionaj prezidantoj de B.E.F., S-roj G. DEBROUWERE kaj D-ro P. DENOEL, estos la Fondaĵon. Ili decidis pri la ĉiujara uzo de la rentumsomoj de la Fondaĵo.

Pri la teknika administrado zorgas G. MAERTENS, kiu ĉiujare raporto pri la stato de la Fondaĵo kaj pri la praktika uzo de la rentumsomoj. Decas ke la Fondintoj estu detale informata pri ĉiu okazaĵo de la Fondaĵo.

La Administrantaro de B.E.F. rajtos estonte plilarĝigi, ĉiunecese, tiun Estraran Komisionon, eventuale al reprezentantoj de aliaj asocioj.

FUNKCIADO : Principe antaŭ la ĝenerala kunveno de B.E.F. - sed ĉiunecese en aliaj okazoj, - la Estrara Komisiono interkonsiligos kun la Estraro de B.E.F. pri la uzo de la disponeblaj sumoj.

La plejble granda ~~parte~~ parto de la rentumsomo estos uzata ĉiujare per rekta propagando, laŭ la deziro de la Fondintoj. Povas tamen estis decidite, ke parto el la rentuma sumo helpu al plifortigo de la fondaĵa kapitalo.

PLIAJ KONTRIBUOJ : Ĉiuj asocioj, grupoj aŭ individuoj, kiuj konscias pri la neceseco de lingvo internacia, estas invitataj, kontribui al la pliriĉigo de la Fondaĵo, ĝirante sian donacon al ~~XXXXXXXXXXXXXXXXXXXX~~, al la p.ĉ. k. n° de

Ne necesas emfazi pri la graveco de tiu Fondaĵo por la estonta agado de la belgaj Esperantistoj. Nek la kontribuado, nek la uzado de la Fondaĵo estas limigata al B.E.F.

Ĉiuj belgaj Gesamideanoj estas petataj, disvasti la ekziston de la Fondaĵo JAUMOTTE-LOQUET en siaj medioj.

Por la Fondaĵo

(d) G. DEBROUWERE

(a) P. DENOEL

(Cirkuleroŝ sendota al ĉiuj grupoj, al esperantistaj asocioj kaj ~~personoj en Belgio~~)